

La **75** Jubilea  
50 JAROJ  
HIZENBERG  
**XXIX UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO**

Varsovio, marto-aprilo 1937

Nr. 3 — 4.

ENHAVO:

1917 — 1937.

Adam Zamenhof — Rememoroj.

Leo Belmont — Pri Zamenhof — Geni'!

Lidia Zamenhof — Venu Varsovion.

Halina Weinstein — Vojaĝo tra bela Pollando.

Di — Pri arangoj de la kongreso.

Alvoko al geinstruistoj.


UABO — raporto.

El la kongresa urbo.

Komunikoj de LKK.

Listo de kongresanoj.

Anoncoj.



D-ro Ludoviko Lazaro Zamenhof.  
Kreinto de la lingvo internacia Esperanto.



## 1917 — 1937

La 14-an de aprilo forpasis 20 jarojn de la momento, kiam forlasis miajn vicojn por eterne la Kreinto de la lingvo internacia Esperanto d-ro L. L. Zamenhof.

Kvankam Li ne estas inter ni — Liaj ideoj kaj idealoj restis por ĉiam la kerno kaj koro de la esperantista movado.

En tiu ĉi jubilea jaro decas reveni pense al la funebra momento de l'morto de nia Majstro, tial parton de tiu ĉi numero ni dedikas al Li.

Redakcio de „La Jubilea“.

## REMEMOROJ PRI LA LASTAJ JAROJ DE MIA PATRO

En aŭgusto 1914 devis okazi la X-a Universala Kongreso de Esperanto en Parizo. Mia patro kune kun la patrino forveturis al la Kongreso, kvankam oni jam ĉie parolis kaj skribis pri la minacanta milito. Sed tamen ĝenerale oni ne tro kredis, ke la milito efektive povas okazi kaj certe neniu supozis, ke ĝi estos tiel serioza kaj longa. Miaj gepatroj veturis tra Germanujo kaj ili ĵus alvenis al Köln, kiam ili eksciis, ke la milito estis deklarita inter Germanujo kaj Rusujo. Oni anoncis al ili, ke ili devas tuj forlasi la Germanujon kiel civitanoj de malamika lando, ĉar Varsovio ja apartenis en tiu tempo al la rusa registaro. Mia patro estis tamen tiel sugestita per la penso pri la internacia paca kunveno en Parizo, ke li eĉ hezitis, ĉu li devas nepre reveni Varsoviajn, aŭ daŭrigi la vojaĝon al Parizo. Li supozis, ke la kongreso malgraŭ tio okazos en paco, kaj, post la kongreso, la milito jam certe estos finita. Sed jam li rimarkis strangan ŝanĝon ĉe la oficistoj kaj kunvojaĝantoj, kaj baldaŭ komprenis, ke la pacaj interrilatoj inter la homoj povas facile kaj rapide malaperi, kiam oni publike anoncas, ke civitano de iu lando aŭ homo de alia gento estas malamiko.

Do, laŭ konsilo de kelkaj germanaj amikoj esperantistaj, miaj gepatroj decidis reveni hejmen, kvankam la vojaĝo jam ne povis okazi per normala vojo kaj ili devis esti preskaŭ forpelitaj en iun neŭtralan landon. Estis do granda ĉirkaŭira vojaĝo tra Svedujo, en amaso da multaj aliaj, depost hieraŭ „malamikaj“ fremduloj, kiuj multnombro troviĝis en tiu ĉi tempo en diversaj germanaj kuraĉlokoj. Tiu ĉi vojaĝo ne nur estis tre laciga kaj malagrabla por mia patro pro ne tro forta stato de lia sano, sed precipe pro la fortega morala bato, kiun li kvazaŭ ricevis, vidante la subite aperintan malamon inter la homoj, al kiuj li predikis la fratecon. Kaj baldaŭ anstataŭ la internacia paca kongreso ekregis en Eŭropo internacia milito.

Li revenis hejmen kun koro rompita ne nur en sencio simbola. La grava kormalsano komenĉiĝis efektive en tiu ĉi malgaja epoko. Malgaja li rekomencis sian ĉiutagan laboron en Varsovio, ĉiam pli malgaja, kiam li vidis, ke la milito fariĝas ĉiam pli kruela kaj la espero pri ĝia baldaŭa fino estas pli kaj pli malcerta.

Kiel juna kuracisto mi jam helpadis al mia patro en lia medicina laboro. Li intencis nur iom post iom enkonduki min en sian kuracistan praktikon kaj tute ne supozis, ke tio okazos subite. Kaj jen la 22 de novembro 1914, dum la nokto, la patrino vekis min kaj, terure timigita, vokis al la patro, kiu sidis sur la lito kun vizaĝo pala kiel papero. La unuan fojon en mia vivo mi aŭdis la parton ĝemi. Li suferis pro fortega doloro de koro. Mi tuj decidis telefoni al iu sperta kuracisto inter la kolegoj kaj amikoj de mia patro, sed li energie malpermesis al mi tion fari, dirante, ke li ja mem estas kuracisto, kiu scias tre bone, ke la atako baldaŭ pasos, kaj li ne volas maltrankviligi kolegojn dum la nokto sen vera bezono. Tamen la doloro daŭris kaj mi, malgraŭ la malpermeso, venigis unu el amikoj de la patro, doktoron Kunig, faman specialiston de kormalsanoj. Kiam li alvenis, la patro jam fartis pli bone kaj forte riproĉis min pro mia malobeo. Tamen montriĝis, ke la stato de la koro estis tre grava kaj la patro estis devigita resti en la lito kelkajn tagojn. Mi dume anstataŭis la patron en lia kabineto por malriĉaj pacientoj, kiuj ĝis tiam grandamase vizitadis lin por demandi konsilon kaj kuracon, kaj de tiu momento mi ne plu allasis lin al tiu vere laciga ĉiutaga matenlaboro. De post tiam li havis matenojn liberajn por labori nur por Esperanto, akceptis pacientojn nur dum du horoj posttagmeze kaj nun jam ne estis devigita sidi ĝis postnoktomezo apud sia skribtablo por fari sian laboron esperantan. Sed denove, kvankam pli trankvile, li laboris dum tuta tago senripoze, preskaŭ ne elirante el la domo. Vane lia zorgema edzino preskaŭ forpeladis lin ĉiutage eksteren, por ke li ĉerpu iom da freŝa aero, movigu la krurojn kaj ventumu la cerbon. Ne ekzistis interesaj lokoj por promeno en la ĉirkaŭaĵo de la strato Dzika, en la malriĉa, sed plena de bruoj kaj movado juda kvartalo. Oni devis veturi malproksimen per tramo aŭ droŝko, por serĉi iom da verdaĵo kaj pura aero. Tial ni pensis, ke estus pli bone por la patro, se li loĝus ie apud ĝardeno, ĉar li certe pli volonte farus almenaŭ malgrandajn promenojn, kiuj ripozigus lin kaj bone influus la staton de lia sano. En julio de la jaro 1915 miaj gepatroj transloĝiĝis en la straton Królewska, apud la centra



urba ĝardeno. Tie ĉi la kondiĉoj por trankvila laboro estis vere bonaj, des pli, ke la patro povis pli facile forgesi la fakton, ke li ne plu estis kapabla al tiel laciga laboro, al kiu li estis al kutimigita en la malnova loĝejo. Nur malmultaj pacientoj estis allasitaj al lia kuracista kabineto, kaj ili ne forbadis al li la tempon, kiun li pli volonte uzis por sia kara ideo.

Li ofte diradis, ke li estus feliĉa, se li povus labori la reston de sia vivo nur por kaj per Esperanto. Li tamen neniam bedaŭris, ke li rezignis de ĉiuj personaj rajtoj koncerne la lingvon mem, sed li esperis, ke eble per sia laboro kiel verkisto kaj tradukisto li povos gajni sufiĉe por la pano ĉiutaga.

La programo de lia tago estis tre precize ellaborita. Ĉiutage dum kelkaj horoj li tradukis en Esperanton la plej gravajn verkojn de la tutmonda literaturo. Estis lia intenco eldoni grandan klasikan bibliotekon, enhavantan kelkajn paralelajn fakojn. Li supozis, ke la fako literatura povos certigi al li konstantan perlaboron kaj permesos al li samtempe okupiĝi pri aliaj fakoj, destinitaj al la lingvaj esploroj, meditoj kaj rememoroj, preparadoj pri filozofiaj kaj etikaj demandoj.


La ideo de homaranismo multe okupis mian patron en tiu — ĉi epoko. Li revis pri fondiĝo de „neŭtrallingva kulturejo“, kie la adeptoj de la pure homa etiko povus kunigi por diskuti pri diver-

saj demandoj. Dume li intencis aranĝi „akcepttagojn“ por tiu — ĉi celo. La simpatianoj de la ideo kolektiĝus por amikaj interparoladoj „por ekzerci la koron kaj spiriton“.

La rompo de ĉiuj internaciaj rilatoj, kaŭzita per la milito, estis tre peniga por la aŭtoro de Esperanto, al kutimigita al la intensa interŝanĝo de ideoj kun samideanoj de la tuta mondo. Li tre suferis pro la perforta izoleco, kvankam kelkaj esperantistaj amikoj ofte lin vizitadis. Inter tiuj amikoj la plej ĝojiga estis ĉiam Grabowski, kiu en tiu tempo tradukis „Sinjoron Tadeon“ de Mickiewicz kaj de tempo al tempo vizitadis mian patron, por tralegi la novajn ĉapitrojn de tiu ĉi majstra verko. Lia entuziasma deklamado de la vere belsona traduko treege interesis mian patron, ĉar en la buŝo de Grabowski Esperanto efektive vivis kaj brilis. Ankaŭ la belege konstruitaj kaj libere fluantaj paroloj de Leo Belmont faris al la patro grandan plezuron. Tre ĝoje vidita gasto estis profesoro Odo Bujwid, la universitata kolego de mia patro kaj lia granda amiko kaj fidela samideano. Kun Wiesenfeld li tre volonte diskutadis pri lingvaj demandoj. Kelkaj aliaj samideanoj de tempo al tempo forpeladis la ombron de izoleco; inter ili estis la tiama havena komandanto de Varsovio dum germana okupado, majoro Neubarth. Sed neniam mia patro ĉesis esti optimisto kaj ĝis la lasta momento de sia vivo forte kredis, ke baldaŭ la terura milito cedos la lokon al la forta kaj frata kunlaborado de ĉiuj popoloj.

En sia laboro li estis tre regula kaj sistemema. La ĉiutaga tasko estis antaŭfiksita kaj devis esti nepre plenumita: tiom da paĝoj de traduko ĉiutage, tiom dum la monato. Mi ofte admiris la akuratecon, kun kiu la laboro estis finita laŭ la dato notita en la kalendaro je la komenco. Kaj se ekzemple tri tagoj estis fiksitaj por ĝoja ripozo post la fino de la traduko de la Biblio, la fabeloj de Andersen jam estis sur la skribtablo precize en la kvara tago. Sed baldaŭ la kormalsano ĉiam pli ofte malhelpadis la regulan laboron ĉe la skribmaŝino. De tempo al tempo li devis resti kelkajn tagojn en la lito por fortigi la koron. Sed li ne povis resti eĉ unu tagon sen laboro. Lia cerbo ne toleris ripozon. Kaj eĉ malsana, li faris notojn en malgranda poŝkalendaro, kiu ĉiam troviĝis sur la noktotablo. Kaj se foje ni singarde volis eniri en lian ĉambron, por rigardi, ĉu li dormas aŭ eble ion bezonas (li neniam mem vokis iun), ni preskaŭ ĉiam vidis lin kun kraĵo en la mano. Li ĉiam meditis, notis, forstrekis, denove skribis, laŭ la devizo, ke oni ĉiam devas noti bonajn pensojn, ĉar alie oni ilin facile forgesas.

Li multe fumis, kaj la kuracistoj malpermesis al li la fumadon, pensante, ke tiamaniere oni pli bone subtenos la forton de lia koro. Li efektive ĉesadis fumi kelkajn fojojn, kaj en la kalendaro ni trovas kelkfoje la noton: „lasta fumado“. Sur unu karteto ni trovas surskribon: Ne fumis 20.III—3.V... 20.V—27.V... 12.VII—25.VII... 15.VIII—



Monumento sur la tombo de Zamenhof en Varsovio.

Fot. eld. N. Szapiro.





Stratabulo ĉe str. Zamenhofa en Varsovio.

Fot. „Foto-Prasa“.

25.VIII... Tiuĵ notoj estis faritaj en la jaro 1916. Sed tiu senigo de cigaredoj estis por li vera sufero, eble ne tiom pro la kutimo mem, sed precipe pro tio, ke li tute ne povis labori sen fumado. Tio estis la sola kaŭzo, ke post kelkaj tagoj aŭ semanoj li denove rekomencadis fumi, dirante ke li preferas vivi iom pli mallonge kaj ion krei, ol vivi longe, sed senutile. Se li tamen tiel ofte ĉesadis la fumadon, tio pravas nur, ke la ripetaj atakoj de kordoloro estis sufiĉe gravaj.

La lastaj semajnoj de lia vivo estis por li tre malĝojaj. Li denove jam ne fumis, sed ankaŭ ne plu faris notojn en sia kalendaro, ĉar, devigita resti en lito pro grandaj suferoj, li estis tiel malfortigita, ke estis al li malfacile ion skribi. Kvankam li neniam plendis, ĉar li ne volis, ke iu alia

ankaŭ suferu, kiam li suferas, tamen li aspektis tiel malĝoje kaj kompatinde, kiel neniam ĝis tiam ni ilin vidis. Sed ŝajnas, ke ĝis la morto li ne tiom pensis pri si mem, kiom pri sia kara ideo, per kiu li volis feliĉigi la homaron, kaj li sentis sin vere malfeliĉa, ke pro la malsano li ne plu povis plenumi sian ĉiutagan taskon, kiu devis konduki lin al la venko.

La lastan tago de la vivo li fartis pli bone. Ŝajnis al li, ke li denove povos rekomenci la laboron kaj tiu penso bone influis sur lian humoron. Sed lia koro subite ĉesis bati, eble en la momento, kiam li pensis:

Ho, mia kor', ne batu maltrankvile...

*Adam Zamenhof.*

## PRI ZAMENHOF — GENI'!

Dediĉe al Halina Weinstein.

Vi estas kulpa, ho, knabin'!  
Ke mian frunton kovris ombr'...  
Mi skribis, laŭ la korinklin',  
Propagandaĵojn ja sen nombr'...  
En artikoloj pruvis mi  
Kaj kantis mi ne unu kanton, —  
Ke estis Zamenhof — geni'  
Kaj kreis lingvon Esperanton,  
Ke estas lingvo—ĉi sub sun'  
La plej facila, ideala,  
Ke por homaro restas nun —  
Fратиĝi sur la baz' neŭtrala!...

Kaj nune petas Vi, knabin',  
Ke mi, maljuna... senidea...  
Tre laca... revivigu vin  
Per artikolo jubilea!  
Vi memorigas pri la rev'  
De la studentaj miaj jaroj;

Vi diras, ke ekzistu dev',  
Ke mi trasaltu tra la baroj  
Ke la amik' de l'Majstro, mi  
Pruvos per mia plum' flamanta,  
Jam vesperigis... ho, ve! — mi  
Elpensis veron tre gigantan,  
Ke estis Zamenhof — geni'  
Kaj kreis lingvon Esperantan!

Ne! Mi ankoraŭ per labor'  
De l'tuta tago rememoris,  
Ke la progres' de nuna hor'  
Malamikecon jam traboris,  
Ke estas atingita cel'  
Duone — sur la baz' neŭtrala,  
En cerbo — ĝis malfrua horo  
Iun penseron, ion ajn,  
En kio estus nova brilo,  
Imago nova, nova ŝajn' —



Valora novpropagandilo!  
Ke geniulo estis Li  
En la kreaĵ' homfratiganta...  
Mi sidas nun kun nuba frunt'  
La tutan tagon, de l'aŭroro,  
Kaj serĉas en la kora fund',  
Per Lia lingvo — sonjuvel',  
La plej facila, ideala:  
Renkontas sin en nia rond'  
Samideanoj elegante,

Juras fratecon antaŭ mond',  
Sed... ne parolas Esperante...

Okazas ankaŭ — ve! — tro brue  
Sceno mirinda, preskaŭ koka:  
Parolas du kunuloj flue  
En insultado reciproka!

Leo Belmont.

Varsovio, 19.IV.1937.

## VENU VARSOVION!

(Parolado de f-ino Lidia Zamenhof antaŭ la mikrofono de Lyon P. T. T. la 4-an de aprilo 1937)

Karaj gesamideanoj! Antaŭ nelonge la kalendaro anoncis alvenon de la printempo. Kaj kun la kreskanta lumo kaj varmo de la tago nia penso rapide trakuras la printempan periodon, kaj jam ni revas pri nia somera libertempo, jam ni faras planojn por niaj someraj plezuroj kaj vojaĝoj.

En la nuna malgaja tempo, kiam la suspektoj kaj malamo pendigas nubon super la homaro, kio povas esti pli plezura por la vera esperantisto, por ĉiu sincera homo, ol trovi sin inter homoj de bona volo, inter samideanoj, kiuj parolos al vi sen pensoj kaŝitaj, sen suspekto kaj malamikeco. Kio povas esti pli plezura, ol trovi sin en tiu revata lando, kiun ni nomas Esperantujo?

Kaj en ĉi tiu jaro la civitanoj de tiu lando pilgrimos al sia Mekko: el ĉiu anguloj de la mondo ili iros en Varsovion. Pelas ilin tien forta deziro paŝi sur tiuj lokoj, kie paŝadis ilia Majstro. Pelas ilin tien sopiro spiri la aeron, kiu spiradis ilia Majstro. Pelas ilin tien korinstigo rigardi tiun domon en la juda kvartalo de la urbo, kie li laboris dum preskaŭ 20 jaroj de sia laborplena vivo, kaj la alian domon, kie li spiris sian lastan spiron, kaj fine puŝas ilin al Varsovio la potenca interna ordono klini la kapon antaŭ la loko de Lia eterna ripozo. La memoro pri la Majstro vokas al ĉiu sincera samideano: Venu Varsovion!

La verda stelo de Esperanto kondukos ĉi-jare al Varsovio la esperantistojn el plej diversaj landoj de la mondo, same kiel iam la stelo kondukis la magojn al Betlehemo.

Kaj unu tago de la kongreso estos dediĉita al speciala pilgrimo: ĉar el la esperanta Mekko, kiu estas Varsovio, la tombourbo de la Majstro, vi iros en Medinon, en la urbon Bialystok, kie por la unua fojo ekvidis la tagan lumon tiu, kiu laboris dum la tuta vivo, por ke la tagoj de la homaro estu pli lumaj. Vi vilos tie la malnovan lignan dometon, preskaŭ kabanon, kiu estas la naskiĝdomo de la Majstro.

Kial do vi hezitas? Kio vekas viajn dubojn? Kial ĝis nun ne multaj decidis firme: Mi iros!?

Ha jes, ankaŭ super la stelbrila Esperantujo ekpendis iaj nuboj. La organiza problemo ĵetas siajn ombrojn kaj multaj demandas sin malkviete: Kiel estos en Varsovio?

Meze de tiuj hezitoj, baraktoj kaj malcertecoj la Loka Komitato akceptis decidon plej ĝustan en tiu ĉi momento kaj plej demokratan: al neniu ĝi donis tronon kaj sceptron, sed ĝi turnas sin al ĉiuj esperantistoj en la mondo, dirante al ili: Bonvenon al vi, kiu ajn vi estas! Bonvenon al vi, el kie ajn vi venas! Bonvenon al vi, al kiuj ajn vicoj vi apartenas!

La Varsovia Loka Komitato laboras en kondiĉoj tiel malfacilaj, kiel eble neniu alia komitato antaŭe. Kaj ĝi laboregas sindone, por certigi al vi plej grandiozan jubilean feston, plej agrablan restadon apud la rivero Vistulo, plej altsentajn impresojn pri la semajna restado en Esperantujo.

Ĝi laboras ankaŭ por certigi al vi agrablajn distrojn. Ĝi laboras, por ke vi trovu en Varsovio bonan akcepton, sed ĉefe kaj antaŭ ĉio ĝi laboras ne por turistaj aŭ distraj celoj. La ĉefa celo de la Loka Komitato estas doni al la samideanoj la eblecon de serioza esperanta laboro, la eblecon grandioze manifestacii la 50-jaran Jubileon de Esperanto kaj eternigi en la koroj de ĉiuj partoprenantoj neforgeseblan memoron pri la Jubilea Festo en Varsovio, tian memoron, kian neforviŝeble gardas en la koroj tiuj, al kiuj la sorto permesis partopreni la unuan Kongreson en Bulonjo sur Maro. Ĝi penas krei atmosferon tian, kia regis en Bulonjo, kie, laŭ la vortoj de Zamenhof, kunvenis unuafoje ne poloj kun rusoj, ne francoj kun germanoj, sed homoj kun homoj.

Kaj ĝi esperas, ke inter same gastamaj muroj de Varsovio, apud Vistulo, kunvenos denove ne nacioj kun nacioj, ne partianoj kun partianoj, sed homoj kun homoj, samideanoj kun samideanoj!

Kaj vi, karaj samideanoj, kiuj min aŭdas ĉi-momente, ne prokrastu, ne hezitu eĉ unu minuton pli: aliĝu tuj al la Jubilea Kongreso en Varsovio!



## VOJAĜO TRA BELA POLLANDO

Mi rakontos al Vi iom pri Pollando.

Mi ne volas enprofundiĝi en la malnovan historion, mi ne volas tuŝi la flavigintajn foliojn, parolantajn pri la grandeco kaj gloro de Pola Respubliko. Ne estas ja facile en kadroj de mallonga artikolo fermi la miljaran vivon de la granda nacio. Mi volas desegni al Vi nur malgrandan bildon de Pollando, mi volas prezenti al Vi nian landon tia, kia ĝi estas nuntempe.

Ni faru do en la fantazio vojaĝon tra Pollando.

Se Vi venos al ni el nord-oriento, tiam la unua impresado donos al Vi eble elreviĝon. Vagonaro, iranta de Turmont — de pola limo — al Varsovio, ruliĝas tra plataj ŝajne eĉ monotona ebenaĵoj, bruetantaj je plenaj grenspikoj, kie la okulo ripozas nur sur blankaj, al la tero alpremitaj, dometoj, dronantaj ofte en flor-kaj fruktĝardenoj.

Malproksime sur la horizonto trakuras tie kaj tie verda muro de pin-kaj foliarbaroj. Jen ĉio!

Pretervojaĝante tiujn ĉi ebenaĵojn, al kiuj nia lando ŝuldas sian nomon (kampo en pola lingvo estas: pole, Pollando — P o l s k a), Vi eble mirospri pri monoteco de nia pejzaĝo.

Por ni tiu ĉi ebenaĵo de Mazowsze (elp. Mazovŝe) havas specialan ĉarmon. Ĝi estas plata kaj enuiga, se oni ĝin rigardas el fenestro de vagonaro. Se oni tamen piediras ĝin per paŝo de semanto, se oni iras renkonte al tiuj ĉi kampoj kun malfermita koro, kiam oni starigas sur rando de l'arbaro, havante antaŭ si ondantan oran maron de spikoj, tiam ĉi-ebenaĵo ĉesas ŝajni monotona neinteresa plataĵo. Ne, neniam!

Kaj kiam Vi iros vilaĝon inter fruktaj ĝardenoj, aŭ eniros kortoj plenajn de zorgemo de terkulturisto, tiam ĉio, kion Vi vidas ĉirkaŭe, ricevas tute specialan valoron kaj signifon, tiam ĉio ĉirkaŭe komencas simili al vivo de abelaro kun ĝiaj klopodoj kaj ĝojoj.

Ne pensu tamen, ke Pollandon formas nur ebenaĵoj!

En la nord-oriento (oriente de la fervojlinio Turmont-Wilno) etendiĝas grandega kaj pitoreska regiono Braŝlavszczyzna (elp. Brasŭavŝĉizna), kiun oni povus nomi „Pola Finnlando“. Granitoj, lagoj kaj arbaroj... Vera „millaga lando“.

Pli sude de ĉi tie estas tre interesa parto de nia lando: tio estas Polesie ĉe la rivero Prypeć, t. n. lando de grandaj kotoj kaj marĉoj, kie — oni diras — en aŭtuno kampulo kune kun veturilo kaj ĉevalo povas subteriĝi. En tiu ĉi landparto, kiu en Mezeŭropo estas vera kuriozaĵo, loĝas malmulte da homoj. Rusujo, por kiu manko de vojoj kaj dezerteco de terenoj havis valoron laŭ strategia vidpunkto, gardis siatempo tiujn ĉi marĉojn, opiniante ke ju pli da koto, des pli bone.

Nuntempe en Pollando estas preparitaj konvenaj planoj por sekigi tiujn ĉi terenojn, kiuj poste servos al ni kiel grandaj kampoj por grensemaĉado. La laboroj tiucele estas komencitaj.

En orienta parto de Pollando disvastiĝas, venantaj preskaŭ al la ĉefurbo, grandegaj arbaroj, kiuj kaŝas nemezureblan riĉaĵon de Pollando. Tie estas malnova arbarego de Białowieza (elp. Biaŭovjeĵa), kie pinoj kaj abioj intermiksiĝas kun centjaraj kverkoj, arbarego multloke ankoraŭ plena de bestoj, arbarego minacanta per netraireblaj marĉoj, arbarego posedanta siajn kaŝlokojn kaj erarvojojn, siajn misterojn kaj sekretojn.



El kolekto de Pola Trafikministerio — Turisma Fako.  
Krakovo. Ĉefplaco kun Draphalo kaj preĝejo de S-ta Mario.  
Fot. H. Poddębski.

En la nordo Pollando prezentas ondecan albelegajn kaj grandajn lagojn. Pli norde la altaĵo maltaĵon, t. n. Kaŝuban Svislandon, kun amaso da supreniĝas al la marbordo, kie en ritmo de kolosaj maŝinoj ĉiutage kreskas kaj pligrandiĝas fiero kaj la plej amata infanco de ĉiuj poloj — Gdynia, la nova pola haveno ĉe Balta Maro.

Kaj nun ni vojaĝu suden kaj sud-okcidenten!

En Silezio jam de malproksime la vojaĝanton per vagonaro salutas arbaro da kamentuboj kaj fabrikfumejoj.

Grandegaj siluetoj de fabrikoj, de metalfandadoj kaj minejoj premas per sia potenco, kaj nokte rigardas la alveninton per milo da sorĉe lumigitaj fenestroj kaj per brilo de senĉese brulantaj fajreroj.

Silezio!

Ŝtalaj pulmoj de Pollando, centro de grandega industrio kaj lando de tiel nomataj nigraj diamantoj!

Ni vojaĝu nun pli suden!

Antaŭ ni la montaro de Okcidenta Beskido, kaj malproksime sur la horizonto desegniĝas ĉielatingaj montoj Karpatoj. Tiu ĉi suda parto de Pollando kun sia neesprimebla ĉarmo de preskaŭ sovaĝa montaro havas nenion similan en Eŭropo.

La granitaj Tatroj, duaj laŭvice post Alpoj koncerne la altecon, estas — ŝajnas al mi — pli belaj ol Alpoj. Tiujn ĉi lastajn malbeligis la civilizo. Ĝi kunligis la montpintojn per ŝtalaj ŝnuregoj kaj alkroĉis al ili vagonojn; ĉe piedoj de la akvofaloj ĝi lokis reklamojn de grandaj firmaoj



kaj de turismaj oficejoj, kaj en la plej belaj de-flankejoj ĝi aranĝis kafejojn kaj dancejojn.

Tiurilate Tatroj evitis malbonan sorton.

Turisto, kiu amas montojn, kompreneble trovos tie rifugejojn, trovos gvidistojn kaj ŝoseojn por aŭtomobiloj, sed dum tutaj tagoj aŭ semajnoj—se li volos — li povas vagi kun sako surdorse kaj renkonti nenium krom paŝtistoj kaj ŝagoj, kies sonoriletoj sonoras sur montaj herbejoj.

En niaj montoj estas tiel mirinde belaj valoj, lagoj, torentoj kaj akvofaloj, ke se Vi ilin ekvidos, neniam Vi ilin forgesos.

Pollando estas granda kaj bela. ne nur bela, ĝi estas ankaŭ riĉa. Havante terkulturistan karakteron (pli ol 60% da loĝantaro vivtenas dank' al laboro sur kampo), Pollando posedas nemezureblajn naturajn riĉaĵojn. Ĝi havas grandegajn karbospacojn, nafton, feron, zinkon, fosfaton, salminejojn ktp. Ĉi-ĉio permesas disvolvi la potenccan industrion, starigante Pollandon en vico de memstaraj, gigantaj, mastrumaj organismoj en Eŭropo.

Se Vi venos Pollandon, unu frapos Vin: eksterordinara ritmo de laboro. Ni konstruas ŝoseojn kaj fervojojn, pontojn kaj publikajn konstruaĵojn, lernejojn kaj hejmojn laboristoj. Kvazaŭ pro tuŝo de sorĉilo aperas ĉiam novaj industribranĉoj, ĥemiaj fabrikoj, esplorlaborejoj. Ni elektrizas la landon.

Hodiaŭa Pollando havas, mi povas diri, du vizagojn. Unu estas kvazaŭ hejmo de nova koloniisto: en ĝi estas multe da plenumitaj laboroj kaj

multe da novaj intencoj; la alia celas rekonstrui tion, kio iam estis grandioza kaj kion la centjara mallibereco kaj la granda mondmilito preskaŭ tute ruinigis.



Varsovio. Str. Krakowskie Przedmieście.  
Fot. H. Poddebski.

Kiam venis la Eŭropa milito, la brulruĝo, eklumigita super la Eŭropa kontinento, estis por ni samtempe rebrilo de la leviganta aŭroro kaj antaŭdiro de pli feliĉaj tagoj.

Dum tiu batalo de nacioj, kiam pri ekzisto de Pollando oni sciis nur dank' al nomoj de vilaĝoj kaj urbetoj, menciataj en mallongaj bultenoj de militistaj staboj, troviĝis ankaŭ militistoj, elititaj el sub la lego de Rusujo pro batalo por patrujo, la militistoj en polaj uniformoj, kiuj en memorinda aŭgusta tago 1914, kiel la Unua Brigado de Józef Piłsudski, transpaŝis la limon de Pola Reĝlando, surskribinte sur sia standardo liberecon kaj sendependecon de Pollando.

Do rigardu Pollandon, kiu ekzistas 1000 jarojn kaj kiu nur dum unu jarcento estis forstrekita el la landkarto de Eŭropo, rigardu nin kiel junan nacion, instruitan de longjaraj spertoj. Nin ne rompis la historiaj tempestoj, ni eliris el ili junaj anime kaj emaj labori. Ni iras antaŭen brakĉe-brako kun la ceteraj eŭropaj nacioj.

Ni havas jare 1/2 de miliono da natura pliigo, ni konstruas popollernejojn kaj en klerigado ni vidas la plej bonan armilon kontraŭ ĉia malbono. Ni konstruis kelkcent institutojn, en kiuj studas ĉirkaŭ 40.000 instruistoj, kaj 30% da ili — tio estas filoj de polaj vilaĝanoj.

Mi bedaŭras, ke Vi ne konas la polan lingvon, kvankam estas tamen unu sfero, kiu povas doni al Vi bonan imagon pri ĝi.

La pola lingvo en senco de muziko posedas en si ion el grandaj interspacoj kaj el grandaj valoj, ĝi enhavas en si ion el arbaro, el ventego kaj el tempesto.

Lingvon de grandaj arbaregoj rekreis en nia literaturo plej grandioze Adam Mickiewicz. La riĉeco de disonancoj en liaj verkoj elkondukas sin guste el tiu ĉi reĝlando de arbaroj. El tio elkondukas sin ankaŭ la riĉeco de konsonantoj, kiuj tiel frapas la orelon de fremdlandano.



Tatroj. Lago „Mara Okulo“.

Fot. H. Poddebski.




La fremdlandano, kiu aŭdas nian lingvon, sentas kiel tonoj batas unu sur alian, kiel ili luktas inter si, rompiĝas, elŝpruĉas kvazaŭ raketoj, plenaj en sia sono kaj pentraj en sia tuteco. De tempo al tempo ili ŝajnigas sin konkorda orkestro, en kiu aŭdiĝas tonoj de fluto aŭ plendo, trairanta en bruon kaj murmureton de l'vento, moviganta foliojn.

Iafoje la pola lingvo, unu el la plej riĉaj je onomatopeaj momentoj, enhavas en si motivojn, plenaj de batalo kaj doloro.

Mi parolas tiel multe pri nia lingvo, ĉar mi scias, ke Vi konas ĝian animon. Vi konas ĝin el tio, kio estas simbolo de nia lingvo, tio estas el la muziko de Chopin. Konante ĝin, Vi konas animon de nia lingvo.

Ne nur ĝin, Vi konas ankaŭ nin mem. Tiuj ĉi momentoj, kiujn Vi sentas en la muziko de Chopin, estas ĝuste sintezo kaj esprimo de pola animo. Ĉu tio estos mazurko aŭ preludo, polonezo aŭ etudo, ĉie tie, ĉe ĉiu muziknoto sidas ĉarmo de pola pejsaĝo, de pola vivo, de polaj kutimoj kaj lingvo.

Kaj nun mi turnas min al Vi: se Vi volas ekoni nin pli bone, vizitu nin. Kiel esperantistoj Vi



El kolekto de Pola Trafikministerio — Turisma Fako Gdynia. Vagonlevilo en la haveno.  
Fot. H. Poddebski.

havos baldaŭ bonan okazon, ĉar en aŭgusto 1937 estos en Varsovio la XXIX Universala Jubilea Kongreso de Esperanto. Vi ekkonos nian ĉefurbon, Vi ekkonos nian landon kaj nin mem.

Venu al ni, Pollando kore invitas Vin!

Halina Weinstein.

## PRI ARANĜOJ DE LA KONGRESO

Ofte oni aŭdas, ke la kongreskotizo estas tro alta. Ni provu esplori, ĉu vere estas tiel. Anticipe ni diru, ke ja 20% de la kongreskotizoj enfluas en la kasojn de niaj Centraj Organizaĵoj, helpante, tiamaniere, al la disvolviĝo de la Movado.

Ni do vidu kion ricevos la Kongresano por 80% de sia mono.

1) Por eniri en la landon oni bezonas ja vizon. Kongresanoj ricevos ĝin, kompreneble, senpage.

2) Sur fervojoj al la Kongresurbo kaj reen, ankaŭ por viziti la landon estas rabato (33% resp. 50%).

3) Krom multaj dokumentoj, insigno, kongreslibro, oficiala monatgazeto „LA JUBILEA“, kongresanoj ricevos 300 — paĝan „Oran Libron“ de la Esperanta Movado.

4) Unika aranĝo estos kabaredo kun artista programo, okazonta dum la Interkonatiga Vespero.

5) Solena Malfermo de la Kongreso ĉiam postlasas neforgeseblan impreson je ĉiu partoprenanto.

6) Solenaĵo ĉe la Tombo de nia neforgesebla Majstro. Ĝin partopreni ja revas ĉiu esperantisto tra la mondo.

7) „Festo de Veteranoj“, dum kiu ni honorigos tiujn al kiuj ni ŝuldas la staton de nia Movado.

8) Internacia Balo — certe ne bezonas reklamon, des pli ke dum ĝi okazos diversaj surprizoj. (Alportu naciajn kostumojn, sed ne fantaziajn. Ni ne faru maskobalon kaj ne ridindigu Vin).

9) Folkloro prezentado montros al la kongresanoj diversecon kaj variecon de polaj naciaj tipoj, kostumoj, dancoj.

10 Esperanta prezentado kaj koncerto ankaŭ okazos.

11) Por montri al la vasta publiko nian ekziston okazos demonstracio tra varsoviaj stratoj, kunligita kun enmurigo de memortabulo en la domon kie loĝis kaj mortis la Majstro.

12) Ekskurso al Bjalistoko — naskiĝurbo de Zamenhof (75% fervoja rabato garantiata. Ni klopodas, ke ĝi estu tute senpaga).

13) En kadroj de la Kongreso okazos ankaŭ TEKA-kongreso, kiu estos potenca demonstracio inter kuracistoj kaj sciencistoj. Ni notu, ke polaj sciencaj aŭtoritatoj multe helpas al sukcesigo de tiu ĉi Kongreso.

14) Grava estas ankaŭ TAGE-konferenco, kies signalvorto estas „esperanto en la lernejojn“.

15) Ĉu ni povas forgesi pri niaj blindaj amikoj, kiuj kunsidos aparte.

16) Ankaŭ multaj aliaj gravaj organizaĵoj kunsidos dum nia Jubilea.

17) Aldone ni diru, ke dum la kongresaj tagoj okazos gvidado tra la urbo, senpaga vizito al ĉiuj muzeoj kaj bildgalerioj kaj ke kongresanoj profitos de rabatitaj biletoj en urbaj tramoj.

Jen estas nur supraĵa kaj neplena skizo de la aranĝoj de la Jubilea Kongreso. Ju pli frue Vi aliĝos, des pli bonaj ili estos. Tial ne hezitu kaj aliĝu tuj al la Kongreso, por ke ĝi estu vera impona manifestacio de nia movado.

Memoru, ke Varsovio, la urbo de Zamenhof atendas kaj kore bonvenigas Vin.

Estu la Kongreso vera festo de la Tutmonda Esperantistaro.



## ALVOKO AL GEINSTRUISTOJ

Karaj Gesamideanoj,  
Interkonsente kun TAGE—Estraro, estas organizita en Varsovio Loka Pedagogia Komitato, kiu volas aranĝi dum La JUBILEA jenajn kunsidojn, kiuj estu kiel eble plej multenombrevizitotaj. La kunsidoj okazos dum la tempo speciale rezervata en la kongresprogramo. La ĉi suba programo havas nur provizoran signifon. Oni aranĝos du kunvenojn po 2 horoj.

### Unua kunveno.

Malfermo kaj laŭtlegado de salutleteroj.

Parolado de d-ro Bj. Beckman, Karlskrona, Svedlando, prez. de TAGE, pri „Kelkaj interna-

ciaj instruistaj problemoj“ (precipe pri TAGE kaj IPR).

Diskutado.

Informa prelego pri Interŝtata Esp. Akordo, de d-ro Antoni Czubyński, docento de Libera Universitato Pola en Varsovio.

Diskutado.

### Dua kunveno.

Prelegoj: 1. Enkonduko de Esp. en lernejojn, 2. Internacia intersanĝado de gelernantoj, 3. Interlerneja korespondado.

Diskutado.



Unu el la stratoj en la moderna Varsovio.



Raporto pri la Internacia Pariza Konferenco (Pentekosto), precipe pri infankursoj.

Diskutado.

Prelego de gimn. prof. M. Sygnarski, Bydgoszcz, Pollando, „Kion opinias junularo pri Esperanto“.

Intertempe okazos la kunsido de la Komitato, kiu preparos proponojn kaj rezoluciojn.

**Vizitoj kaj akceptoj.**

Kvankam Esp. — problemo estas la komuna zorgo de ĉiuj fakuloj, tamen ni, instruistoj, komprenas, ke la fundamenta kondiĉo de ĝia disvolviĝo estas ĝia samtempa enkonduko en la ler-

nejojn de kelkaj landoj. Tial Esperanto estas antaŭ ĉio la instruista afero.

La sukceso dependas sole de partopreno de alilandaj kolegoj, kiuj ne nur povus doni al niaj kunvenoj la karakteron de malgranda Internacia Pedagogia Kongreso, sed ankaŭ popularigi la rezoluciojn, pri kies realigo oni laboras en iliaj landoj.

Ni do petas gekolegojn alveni Varsoviajn kaj anonci sian ĉeeston antaŭ ĝenerala kongreso. Varsovio, aprilo 1937.

Prezidanto de TAGE:

Pedagogia Komitato:

d-ro Bj. Beckman.

d-ro A. Czubryński.

## UNIVERSALA ASOCIO DE BLINDUL-ORGANIZAJĜOJ (UABO) RAPORTO

Okaze de la enketo aranĝita de L.K.K. de XXIX. U. J. E. K. en Varsovio por konstati la nunan staton de la Esperanto — instruado en la lernejoj ankaŭ „UABO“ aranĝis similan enketon inter la blinduloj kaj kolektis jenajn statistikajn datojn:

### ESPERANTO EN BLINDULLERNEJOJ.

Esperanto estas instruata en 15 landoj, entute en 27 lernejoj, kaj nome:

Anglujo 2, Aŭstrujo 1, Bulgarujo 1, Ĉeĥoslovakio 3, Danujo 1, Finnlando 3, Francujo 1, Hispanujo 1, Hungarujo 2, Jugoslavio 3, Nederlando 4, Norvegujo 2, Polujo 2, Svedujo 1, Estonio 1.

En la plej granda parto de lernejoj oni instruas esperanton fakultative, nur en 2 lernejoj devige (Norvegujo kaj Ĉeĥoslovakio po 1 lernejo).

La instruado okazas po 1 — 3 horoj semajne, en la lastaj klasoj por infanoj de 10 — 20 jaroj.

La nombro de lernantoj estas varia entute ĝis la marto 1937 j. lernis esperanton ĉ. 260 blinduloj. Instruas 24 personoj: 14 vidantoj kaj 10 blinduloj. El ili 7 estas diplomitaj. En pluraj lernejoj ekzistas esperanto-kluboj, propraj esperanto-sekcioj en la bibliotekoj, brajle eldonitaj esperanto-lernolibroj, vortaroj, legolibroj ktp.

### Esperanto en la blindulaj bibliotekoj.

En multaj landoj en la brajlaj bibliotekoj ekzistas apartaj esperanto-sekcioj, en aliaj troviĝas nur kelkaj aŭ kelkdekoj da esperantaĵoj. Sur la ĉefloko staras la National Library for the Blind en Londono, ĉ. 900 volumojn hungara 200, 3 nederlandaj 173 ĉ, ĉeĥoslovakaj 140, franca (Valentin Haŭy) 100, Svedujo 65, Polujo 50 k. t. p. entute 1.775 volumoj en 6 bibliotekoj, 12 vortaroj (esperantalilingvaj kaj inverse), gramatikoj, lernolibroj, legolibroj en multaj landoj brajle presitaj.

### Blindaj esperantistoj instruantaj la vidantojn.

En pluraj landoj blindaj esperantistoj instruas esperanton al la vidantoj individue aŭ al grupoj, gvidante kursojn. Entute laŭ nesufiĉe preciza statistiko 24 blinduloj (12 diplomitaj) en 8 landoj. La instruado okazas plejparte senpage.

### Kontakto kun la ĝenerala esperanto-movado.

Preskaŭ ĉie inter la blindula esperanto-movado kaj la ĝenerala movado ekzistas intima kontakto kaj kunlaborado, preskaŭ ĉie la vidantoj volontas kaj senegoiste subtenadas la blindulmovadon. Ili monsubtenas la eldonadon de brajlaĵoj en esperanto, vojaĝojn de blinduloj al universalaj esperanto-kongresoj, traskribas en brajlo librojn, kunlaboradas en la blindulafero ktp. Modele laboradas la sveda Esperanto Instituto, kiu eldonas internacian esperanto bibliotekon en brajlo, ekzamenas ĉiujn lernantojn absolvantajn la svedan blindul-lernejon kaj rekomendas ilin al la viadantaj samideanoj en la lokoj, kien revenas la blinduloj post la lernado. Per tio la blinduloj enviĝigas en la ĝeneralan esp. movadon en Svedujo.

La „UABO“ — Komitato aranĝis en la 1931 j. grandan propagandan agadon en ĉiuj landoj, eldoninte en brajlo kaj en nigra preso la propagandan folion kun rezolucioj, postulantaj enkondukon de esperanto en ĉiujn blindullernejojn kiel devigan lernaĵon. Tiun ĉi akcion UABO ripetos verŝajne ĉi jare konforme al la tendencoj de la XXIX. Universala Jubilea Esperanto Kongreso en Varsovio.

Aparte ni substreku, ke UABO kaj precipe ties ĝeneral-sekretario, Harald Thilander, kaj lia edzino Varma Thilander, intense disvasitgas esperanton inter la blinduloj pere de:

eldonado de „ESPERANTA LIGILO“, ĉeforgano, monatrevo, de UABO, eldonata de post 1904 j. (fond. prof. T. Cart el Parizo), de post 1907 eldonita en Stocksund (Svedujo). „Esperanta ligilo“ havas ĉ. 900 abonantojn en ĉ. 30 landoj.

„NIA MONDO“ — dumonata revuo (literatura, popularscienca) 200 ekzempleroj, proksimume en la samaj—landoj,

eldono de Internacia Esperanto-Biblioteko en brajlo — perloj de naciaj literaturoj en esperanto-traduko, entute 12 libretoj,

eldonado de diversaj lernolibroj (Konversacia literaturo de Cseh. komerca korespondado ktp.), legolibroj, beletristikaj libroj ktp.,

presado de gravaj materialoj de blindulafero en esperanto,



funkciado de Internacia Blindula Informejo kaj Statistikejo (IBIS) disponiganta al interesigantoj la informojn pri la blindulafero en la mondo, eldonante „LIGILON POR VIDANTOJ“ kaj aliajn publikigajojn pri la afero, kiuj helpas al la blinduloj propagandi ĝin en propra lando, gajni novajn amikojn kaj helpantojn,

aranĝado de internaciaj blindulaj esperanto-kongresoj en la kadroj de U.E.K. Entute ĝis 1937 j. okazis 13 tiaj kongresoj kaj 2. ĝeneralkunvenoj de „UABO“,

kunlaborado kun plej gravaj naciaj blindulaj kaj porblindulaj organizaĵoj, starantaj ankoraŭ ekster UABO, sed amike interrilatantaj kun ĝi,

iniciato en la aranĝo de internaciaj agadoj favore de blinduloj.

Dum lastaj tagoj UABO eldonis brajle presitan karton de Varsovio kun esp. — klarigoj. Baldaŭ aperos ankaŭ la geografia karto de Polujo por blinduloj. Ambaŭ kartoj estas prilaboritaj en Londono, presitaj en la presejo de „Esperanta Ligilo“ en Stocksund (Svedujo).

Unu el plej agemaj centroj de la movado tro-

vigas en Zemun (Jugoslavio), kie sub energia gvidado de estiminda s-ano V. Ramadanović, direktoro kaj fondinto de la modela Blindulinstituto, honora membro de UABO, agas la klubo „Nova Lumo“. Tie ankaŭ troviĝas brajla presejo k. unu el plej kompletaj esp. — brajl-bibliotekoj. En tiea Instituto esperanto estas derige instruata. Ankaŭ en la Ŝtata Blindulinstituto en Varsovio oni instruas nian lingvon jam de post kvin jaroj. La direktoro s-ro Zawadzki tre favoras nian movadon kaj ĵus mem lernas esperanton.

Esperanto do progresas bone inter la blinduloj, ofte eĉ relative pli bone ol ĉe la vidantoj, sed nature ĝi tre dependas de la ĝenerala stato de esperanto-movado kaj pro tio estas vive interesita pri la ĝenerala progreso de nia komuna afero en la tuta mondo.

Plej intima kunlaborado de vidantoj kaj blinduloj estas en reciproka grava intereso.

Prezidanto de UABO:

Jan Silhan

Lwów, Kolonia profesorska, Polujo.

## EL LA KONGRESA URBO

### ANTAŬKONGRESAJ LABOROJ DE MORARIU EN POLUJO.

**Varsovio.** Publika kurso de Morariu en la Blindulinstituto (por vidantoj), kiu komenciĝis kun 24 kursanoj, nun havas jam ĉ. 60 partoprenantojn. Kurstagoj: lundo kaj ĵaŭdo.

Alia kurso okazas ĉe strato Zielna, la sidejo de Varsovia Esp. Soc., por studentoj kaj aliaj, dum mardoj kaj vendredoj.

Trian vesperkurson gvidas Morariu en varsovia urboparto „Prago“ por ĝeinstruistoj, dum merkredoj kaj sabatoj. Ĉiuj tri kursoj okazas de la 8-a ĝis la 10-a vespere. Dum ĉiuj posttagmezoj inter la 6—8 horoj kurso por entute tricent policistoj en la polica lernejo.

Nia rumana samideano, kune sia fama amiko, s-ro Forge, partoprenis per entuziasmigaj paroladoj la Akademianj Memorfestojn de la Kooopera Esp. Klubo „Vitraj Domoj“ kaj „Varsovia Esp. Soc. Dum la samideanara soleno en la hebrea tombejo s-ro Morariu demetis florkronojn sur la tombon de nia Majstro en la rumanaj kaj svedaj koloroj.

Kiel ĉefdelegito de la Ruman-Pol-Sveda Junulara Federacio, T. Morariu faris sukcesajn lumbildprelegojn en esperanto pri R u m a n u j o, bone interpretitajn al la pola lingvo de s-ro instruisto Głuchowski. La plej unua parolado okazis en lernejo no. 70 (str. St. Vincento) por entute 250 lernantoj kaj gepatroj. La dua en lernejo no. 79 (str. Okopowa) por pli 100 lernantoj de la superaj klasoj kaj 15 instruistoj. Ĉe la tria lumbildparolado pri Rumanujo 300 lernejanoj, ankaŭ iliaj klasestroj, dankis la oratoron kaj interpretiston per longdaŭra, laŭtakta aplaŭdado. Post la prelego la ĝejnuloj

faris grandstilan atakon kontraŭ la parolinto per siaj aŭtografaj libretoj.

La 9-an de majo dimanĉe Morariu parolados publike ĉe „Vitraj Domoj“ pri „S v e d u j o, la lando de l' kulturo kaj paco“.

Por la 23-a de majo (dim.) s-ro Morariu estas invitita de ĉefjuĝisto Sakowicz al Mlava, por fari lumbildprelegon pri R u m a n u j o ĉe turisma Societo „Mara ligo“.

\* \* \*

### ĈU VI FUMAS?

En Polujo Vi povos aĉeti ĉiuspecajn tabakojn, cigarojn kaj cigaredojn. De la plej malmultekostaj ĝis luksaj. Ankaŭ eksterlandaj tabakaĵoj estas aĉeteblaj en ĉiu tabakvendejo ekz. Camel, Chesterfield, Gitanes k. t. p.

### NE DONU TRINKMONON!

Ne estas kutimo ĉe ni doni apartan trinkmonon en restoracio, kafejo, taksio, fiakro. En hoteloj — demandu, ĉar plej ofte oni alkalkulas servokotizon al ĝenerala fakturo. Kompreneble, Vi povas lasi al la ĉambristino 1 aŭ 2 zlotojn ĉe Via foriro; (precipe se ŝi estas beleta...); estas Via bona volo.

### SE VI SOIFOS...

Ĉar LKK mendis en ĉielo belan veteron por la kongresa semajno, espereble multaj el Vi, karaj kongresantoj, ofte soifos. Precipe tiuj kiuj kutimas... Eĉ plej ardan soifon oni povas facile nuligi en Varsovio. La plej ordinara maniero estas eltrinki glason da „woda sodowa“, tre bongusta kaj pura akvo gasumita. Ne kostas multe: 5 aŭ 10 groŝojn. Kun citrona aŭ ĉeriza suko: 15 — 20 groŝojn. Iom pli komforta trinkaĵo estas biero. Ĝin Vi ricevos



ne en kafejo (kiel en kelkaj landoj), sed en restoracio aŭ baro. Malgranda glaso (franca „un bock“) kostas 20 — 30 groŝojn. Vi devas diri: „angjelka jasnego“ (por blonda), „angjelka cjemnego“ (por la bruna). Pli granda glaso: „maŭe jasne“ aŭ „maŭe cjemne“. Plej granda glaso: „duje jasne“ resp. „duje cjemne“. — Absolute ne forgesu viziti faman vinejon de Fukier en la Ĉefplaco de Malnova Urbo. Tie Vi gustumu la faman polan mielakvon. Tie ankaŭ oni povas ricevi malnovegan vinon, la firmao ja ekzistas depost la 1610 jaro. Se Via soifo estas alispeca, tiam demandu unu el niaj amikoj, ekzemple... nu, ni ne citu nomojn, ne sufiĉus loko por ĉiuj!... Jes, prohibicio ĉe ni ne ekzistas.

### STRAT-TRAFIKO.

Simpla bileto en tramveturilo kostas 20 gro-

ŝojn, sed kongresanoj ricevos specialan rabaton. Aŭtobusoj, depende de la distanco, 15, 20, 25 gr. Taksioj malgrandaj po 40, pli grandaj po 50 groŝojn unu kilometro. Fiakro kostas 1 zloty por distanco ĝis 3 kilometroj. En tramveturiloj oni eniras malantaŭe, eliras — antaŭe; fumado permesita nur en la dua vagono. Strat-trafiko dekstra.

### GAZETOJ.

Ĉiuj pli gravaj eksterlandaj gazetoj kaj ĵurnaloj estas aĉeteblaj ĉe stratvendistoj sur ĉefaj stratoj. Tre versaĵne dum la kongresa semajno estos eldonata speciala ĉiutaga gazeto esperantlingva kun ĉiuj lastaj novaĵoj. Ĝin povos ankaŭ aboni samideanoj, kiuj (bedaŭrinde!) ne povos veni al Kongreso. Detaloj sekvos. —

(Daŭrigota)

## KOMUNIKOJ DE LKK

### D-ro JAN MEĎRKIEWICZ.

Kun granda bedaŭro ni komunikas pri la neatendita morto de unu el la plej konataj esperantistoj en Polujo d-ro Jan MeĎrkiewicz. D-ro J. MeĎrkiewicz naskiĝis la 12-an de novembro 1888 en Lublin. Esperantisto de la jaro 1906 li energie, ofere kaj ageme partoprenis la pollandan kaj internacian Esperanto-movadon. Ne estante formale membro de LKK li ĉiam servis per sia valora konsilo kaj estis prezidanto de la Komisiono de Internaciaj Problemoj ĉe LKK. Al la funebranta familio ni esprimas nian plej sinceran kunsenton.

### ADRESO DE LKK:

Warszawa, 1, str. Chmielna 26 m. 8. Tel. 278-55 kaj 278-08. Pola Poŝtĉekkonto: 29 Universala Jubilea Kongreso de Esperanto, Warszawa Nr. 23.445 kaj Societe Generale des Banques en Pologne.

Telegramadreso de la kasisto: Lublipres, Warszawa.

### ALDONO AL INTERKONSENTO INTER IEL KAJ LKK.

Ambaŭ Komitatoj interkonsentas, ke la licencpago estos dividita inter IEL kaj UEA laŭ la principoj proponitaj de Sveda Esperanto-Federacio la trian de februaro 1937 konforme al la deziroj de la kongresanoj mem.

LKK estas respondeca al IEL kaj UEA pri la laŭstatuta plenumo de la licencpago. La licencpago estas pagata al la nomitaj organizaĵoj proporcie al la kongrespartopreno kaj deziro de la kongresanoj. El tio rezultas, ke la kongresanoj, kiuj venos el landoj, kies asocioj aliĝis al IEL, estas konsiderotaj kiel IEL—membroj, se ili ne esprimas alian deziron.

Teknikan flankon de la tuta afero prizorgos oficejo de LKK interkonsente kaj sub kontrolo de IEL kaj UEA.

Sama aldono validos por interkonsento kun UEA. Varsovio, la 22 de aprilo 1937.

### INTERNACIA BALO.

LKK insiste petas gesamideanojn havantajn naciajn kostumojn kunpreni ilin por internacia balo.

### STRATA DEMONSTRACIO ESPERANTISTA.

LKK volas organizi dum Kongreso stratan manifestadon por honorigi la Majstron. Tial ni insiste petas ĉiujn grupojn kaj societojn esp. alporti al Varsovio siajn standardojn. — Krome ĉiu landa Asocio alportu ankaŭ nacian flagon. Ni projektas stratmarŝadon kun flagoj kaj standardoj, kio tre bone efikas la neesperantistan publikon.

### GASTOJ DE LKK.

La 26-an de marto venis Varsovion s-ano E. Malmgren, Sekretario de la Sveda Esperanto-Federacio por preparoli la aranĝon de sveda karavano. LKK havis specialan kunsidon kun s-ano Malmgren, dum kiu oni tre kontentige aranĝis ĉiujn aferojn. Post vizito de nia ŝatata gasto LKK estas tute certa, ke sveda karavano brile sukcesos.

Por vigligi la movadon en Varsovio kaj doni la eblon al tre multaj interesuloj lerni nian lingvon antaŭ la Jubilea LKK speciale venigis Varsovion la duan simpatian samideanon el Svedlando Tiberio Morariu, kies lertaj ĉe-metodaj kursoj estas tiel famekonataj. Li ilin jam komencis kun granda sukceso kaj kontento de liaj lernantoj.

Post kelkaj tagoj s-ano Morariu komencos kurson por policanoj kun ĉirkaŭ 250 partoprenantoj. LKK jam nun povas danki al li por tre bona laboro.

Kelkaj prelegoj de s-ano Morariu okazis ankaŭ kun granda sukceso.

Dum aprilo venis Varsovion s-ano Vilmos Bleier, kun kiu LKK preparolis tre gravajn eldonaferojn. Krome ni aranĝos kun Literatura Mondo kabaredon esperantistan kaj espereble ankaŭ Literaturan Vesperon.



**RIMARKOJ.**

Pri fervoja rabato, vizoj, loĝejoj, manĝaĵoj legu en La Jubilea Nr. 1—2.

**KARAVANOJ:**

Pri la karavanoj legu en La Jubilea Nr. 1—2. Anoncita estas ankaŭ karavano el Bulgarujo: Bulgara Esperanto Asocio, Societo „Espero“, Ruse, s-ro Dimitr Ivanov, 28 Prista.

Anstataŭ s-ino Borel karavanon aranĝas s-ro Pialla, 51, Rue J. Guesde, Vlleurbanne, Francujo.

**GLUMARKO.**

Estas preta bela kongresa glumarko. Por 1 zł. aŭ 2 respondkuponoj ni sendas 50 glumarkojn. Uzu la kongresan glumarkon sur ĉiu Via korespondaĵo!

**PROPAGANDAJ BROŝUROJ:**

Aperis jam belaj broŝuroj pri Varsovio, Krakovo, Vilno kaj Gdynia eldonitaj de Pola Trafikministerio. La broŝurojn ni baldaŭ komencos dissendadi.

**JUBILEA STELO.**

Pioniroj de nia movado. Bonvolu atente tralegi la komunikon en La Jubilea Nr. 1—2 kaj sendu al ni Viajn nomojn, adresojn kaj sugestojn.

**KONGRESKOTIZOJ.**

Ni memorigas, ke la 20% rabato validas ĝis la 15 de majo. Do, ne hezitu kaj aliĝu tuj!

**PROPAGANDAJ MURAFIŜOJ.**

LKK sendas senpage al ĉiuj organizadoj kaj samideanoj belajn murafiŝojn pri LA JUBILEA.

**LISTO DE KONGRESANOJ**

- |   |   |
|---|---|
| 206. Józefowicz Waclaw, instruisto, Zórawia 1, Warszawa, Polujo.  | 223. Musella Vincenzo, licea ŝtata profesoro, Via 4, Roma, Italujo.                     |
| 207. Widberg Elin, f-ino, Mörbylanga, Svedujo.  | 224. Musella Alma, s-ino, Via Giuseppe Sacconi Giuseppe Sacconi 4, Roma, Italujo.       |
| 208. Bonander Edvin, Karlskoga, Svedujo.  | 225. Deligny Ernest, bibliotekisto, Rue Allent 4, Saint-Omer (Pas de Calais), Francujo. |
| 209. Bonander Gertrud, s-ino, Karlskoga, Svedujo.   | 226. Wessendorf C. J., telefonistino, f-ino, Marxkade 106—3, Amsterdam—C, Nederlando.   |
| 210. Forsman Helmer, Karlskoga, Svedujo.  | 227. Bakker A. C., telefonistino, f-ino, Rijnstraat 119—2, Amsterdam—Z, Nederlando.     |
| 211. Gullberg Maja, f-ino, Box 59, Grycksbo, Svedujo.   | 228. Schabracq J., f-ino, Ochterveltstraat 37—a, Rotterdam, Nederlando.                 |
| 212. Hetzel Henry W., profesoro en Publika Altlernejo, S. 37 th St. 119, Philadelphia, Penn'a, Usono.                           | 229. Persson Charles, brosfaristo, Bonehann, Svedujo.                                   |
| 213. Setälä Vilho, redaktoro kaj fotografisto, Muusekatu 40 A, Helsinki, Finnlando.   | 230. Lindgren Olof Henning, agordisto, S:t Annegatan 15, Nyköping, Svedujo.             |
| 214. Jung Teo, redaktoro-eldonisto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.   | 231. Rezervita.   |
| 215. Muusses Jan, eldonisto, Purmersteenweg 9, Purmerend, Nederlando.   | 232. Lindblad Valborg, f-ino, Drottninggatan 33, Hälsingborg, Svedujo.                  |
| 216. Glück Julius, verkisto, redaktoro de „Muusses Esperanto-Biblioteko“, inĝeniero, Jacob Catslaan 18, Amersfoort, Nederlando. | 233. Lindblad Britta, f-ino, Klippan, Svedujo.  |
| 217. Sakowicz Roman, juĝisto, Reymonta 3, Mława, Polujo.  | 234. Hagerman Jonanda, f-ino, Klippan, Svedujo.   |
| 218. Juringius Nils Karl, doktoro de filozofio, Drottningholmsvägen 76, Stockholm, Svedujo.                                     | 235. Karlsson Hilda, f-ino, Klippan, Svedujo.   |
| 219. Olson Erik Alvar, brosfaristo, Lendalsgatan 31, Alingsas, Svedujo.   | 236. Gullberg Valborg, f-ino, Box 59, Grycksbo, Svedujo.                                |
| 220. Cano Alfonso, Rue de la Judi 15, Tamaris, Francujo.  | 237. Gullberg Ruth, f-ino, Box 59, Grycksbo, Svedujo.                                   |
| 221. Geffner Max, redaktoro, Hohe Warte 9, Wien XIX, Aŭstrio.   | 238. Merrick W. Percy, Penso, Shepperton, Britujo.                                      |
| 222. Holmin Elli Wiola, f-ino, Skarsta, Hallstavik, Svedujo.  | 239. Merrick M. Charlotte, s-ino, Penso, Shepperton, Britujo.                           |
|   | 240. Pruski Czesław, juristo, Przechodnia 2, Lublin, Polujo.                            |
|   | 241. Pruska Jadwiga, lernantino, Przechodnia 2, Lublin, Polujo.                         |



242. Brazila Ligo Esperantista, Avenida Marechal Floriano 212, Rio-de-Janeiro, Brazilo.
243. Le Rütte J., f-ino, Prinsesseweg 58-a, Groningen, Nederlando.
244. Fahrner Charles Felix, eks.-Korvet-kapitano, Boulevard des Lices — S-te Anne, Villa Dared-Drouj, Toulon (Var), Francujo.
245. Exlère Alexandre, bibliografiisto kaj tradukisto, Square Desnouettes 2, Paris XV, Francujo.
246. Jacob, emerita profesorino, s-ino, Esperanta Dometo, Boulevard Dessaix, Thonon-les-Bains (Haute Savoie), Francujo.
247. Morariu Tiberio, profesoro kaj redaktoro, Engelbrektsg. 16, Örebro, Svedujo.
248. Morariu Lizzie, s-ino, Engelbrektsg. 16, Örebro, Svedujo.
249. Głuchowski Bolesław, instruisto, Św. Wincentego 80, Warszawa, Polujo.
250. Lejzerowicz Izrael, Kilińskiego 30, Łódź, Polujo.
251. Lejzerowicz Regina, s-ino, Kilińskiego 30, Łódź, Polujo.
252. Żbikowski Antoni, advokato, Piłsudskiego 51, Tomaszów Lubelski, Polujo.
253. Keily Patrick Thomas, ĵurnalisto, Chantry Road 31, Alford, Britujo.
254. Pesić Petar, laboristo, Cara Dušana 111, Dom Slepih „Viteškog Kralja Aleksandra I Ujedinitelja“, Zemun, Jugoslavujo.
255. Hegre Nils, fervojtelegrafisto, Brumunddal, Norvegujo.
256. Aafjes J. S., f-ino, Schiedamschesingel 132-b, Rotterdam, Nederlando.
257. Tveit Magnus, desegnisto, Torvgaten 3, Hamar, Norvegujo.
258. Van Vliet A. H. E., instruistino, f-ino, v. Boetzelaerstraat 45, Alpen a. d. Rijn, Nederlando.
259. Wajsberg Aron, librotenisto, Dwernickiego 5, Dubno, Polujo.
260. Alperton Mened, Middelseex, Britujo.
261. Pialla Augustin Marius, instruisto, 51 Rue J. Gvesde, Villeurbanne, Francujo.
262. v. d. Graaf Ans, f-ino, Goudschosingel 190, Rotterdam, Nederlando.
263. Uline Paul, urba arĥitekto, Victor Hugo 16, Vienne, Francujo.
264. Uline Renée, s-ino, Victor Hugo 16, Vienne, Francujo.
265. Hoffmann Oskar, tornisto, Podgórze 10, Nowy Bytom, Polujo.
266. Tancredi A. Raffaele, profesoro-inĝeniero, Via S. Lorenzo 26/8, Savona, Italujo.
267. Grzegorzewska Maria, d-rino, direktorino de Ŝtata Instituto por Speciala Pedagogio, s-ino, Al. Ujazdowskie 20, Warszawa, Polujo.
268. Kurnatowska Wanda, redaktoro, s-ino, Zygmuntowska 9, Warszawa, Polujo.
269. Zawadzki Edward, direktoro de Ŝtata Blindul-Instituto, Pl. Trzech Krzyży 4—6, Warszawa, Polujo.
270. Macelkówna Zofia, instruistino, f-ino, Pl. Trzech Krzyży 4—6, Warszawa, Polujo.
271. Zahór A., d-ro, okulkuracisto, Na Poriči 37, Praha II, Ĉeĥoslovakujo.
272. Wagner Edwin, majoro, deputito de Parlamento, Hoża 1, Warszawa, Polujo.
273. Konwiński B., instruisto, Kołłątaja 11, Bydgoszcz, Polujo.
274. Ramadanović Veljko, direktoro de „Dom Slepih“, „Dom Slepih“, Zemun, Jugoslavujo.
275. Ljunggren Verner, korbfaristo, Majorsgatan 12, Stockholm, Svedujo.
276. Anderson Erik, brosfabrikisto, Döbelnsgatan 1, Borås, Svedujo.
277. Olson Eric, Arlöv, Svedujo.
278. Retsler Frida, s-ino, Majorsgatan 12, Stockholm, Svedujo.
279. Retsler Ernst, direktoro, Majorsgatan 12, Stockholm, Svedujo.
280. Oehstroem Hjördis, Folkungagatan 51.IV., Stockholm, Svedujo.
281. Lackland Sune, agordisto, Parkgatan 10.II., Stockholm, Svedujo.
282. Lackland Anna Lisa, f-ino, Parkgatan 10.III., Stockholm, Svedujo.
283. Bentsen Andreas, fotografist-asistanto, Vallekilde, Danlando.
284. Bentsen Hanne, domservistino - kuiristino, f-ino, Vallekilde, Danlando.
285. Eby Samuel C., eldonisto, 42 Nd. St. 320 East. New York, Usono.
287. Faucher Germain, instruistino, f-ino, Boulevard Arago 27, Paris, Francujo.
288. Dubois, emerita profesorino, s-ino, Leconte de Lisle 33, Paris, Francujo.
289. Jeangirard, emerita profesorino, s-ino, Leconte de Lisle 33, Paris, Francujo.
290. Roy Ernest, rentulo, Beauvoir 29, Blois, Francujo.
291. Zamenhof Mieczysław, d-ro, kuracisto, Senatorska 36, Warszawa, Polujo.



292. Sletterod Agot, s-ino, Trollsvingen 5, Ulleval Haveby, Norvegujo.
293. Sletterod Ole. Brochmann, ingeniero, Trollsvingen 5, Ulleval Haveby, Norvegujo.
294. Bye Rosa, instruistino, f-ino, Wm. Thranes 61, Oslo, Norvegujo.
295. Walle Antonie, f-ino, Wilhelmsgate 2b, Oslo, Norvegujo.
296. Grønneberg Esther, kasistino, f-ino, Industriegaten 28.II., Oslo, Norvegujo.
297. Nilssen Esther, oficistino, f-ino, Haxthausengate 1, Oslo, Norvegujo.
298. Danielsen Harda, oficistino, f-ino, Glückstadsgt. 5, Oslo, Norvegujo.
299. Ottesen Björn, sekcia-ĉefo, Pareliusveien 36, Oslo, Bekkelagshøgda pr. Oslo, Norvegujo.
300. Garewicz Juliusz, lernanto, Żwirki 4, Łódź, Polujo.
301. Maske Brunon, Rynek 46, Szamotuły, Polujo.
302. Olszowski Włodzimierz, bibliotekisto, Ratajczaka 4—6, Poznań, Polujo.
303. Kołodziej Emil, urboficisto, Dąbrowskiego 32, Chorzów, Polujo.
304. Sandberg Eva, f-ino, Bekkelaget ĉe Oslo, poŝtadreso: Box 197, Norvegujo.
305. Stop-Bowitz Carl, studento, Gjetemyrsvn. 11, Oslo 37, Norvegujo.
306. Froliková Alžběta, s-ino, Žižkovo nam. 1302, Pišek, Ĉeĥoslovakujo.
307. Pellet André, Rue des Villas 7, Lyon, Francujo.
308. Huber Hans, instruisto, Merkersdorf, Post Ernstbrunn, Aŭstrio.
309. Isbrücker J. R. G., ingeniero, Oostduinlaan 32, Den Haag, Nederlando.
310. Isbrücker Ellen, f-ino, Oostduinlaan 32, Den Haag, Nederlando.
311. Fachinotti Guido, d-ro, apotekisto, Corso Garibaldi 12, Valenza, Italujo.
312. Fachinotti-Vecchio Giacomina, s-ino, Corso Garibaldi 12, Valenza, Italujo.
313. Fethke-Forge Jan, verkisto, Puławska 134, Warszawa, Polujo.
314. Vérot Francisque, instruisto, Rue des Villas, Saint-Etienne (Loire), Francujo.
315. Vérot Victoire, instruistino, s-ino, Rue des Villas, Saint-Etienne (Loire), Francujo.
316. Vérot Euphrasie, studentino, f-ino, Rue des Villas, Saint-Etienne (Loire), Francujo.
317. De Filippo Pietro, studanto, Vicoletto Trinita Spagnoli 3, Napoli, Italujo. (Ĉe prof. Stellacci).
318. Bleier Vilmos, redaktoro-eldonisto, Soroksari-ut. 38, IX Budapeŝt, Hungarujo.
319. Ith Elisabeth, s-ino, Rue Portalis 21, Aix-en-Provence, Francujo.
320. Strzelecki Hieronim, juĝeja defendanto, Rynek 17, poŝtkesto 11, Golub (Pomorze), Polujo.
321. Peschke Klara, s-ino, Koprivnice 225, Ĉeĥoslovakujo.
322. Privat Edmond, universitata docento, redaktoro, Villa Bellavista, Locarno, Svislando.
323. Juhlin Bertil, S. Fiskaregatan 16, Gävle, Svedujo.
324. Glemminger Olof, poŝtoficisto, Stenbocksgatan 6, Malmö, Svedujo.
325. Glemminger Lilly, popollerneja instruistino, s-ino, Stenbocksgatan 6, Malmö, Svedujo.
326. Carlsson Adéle, f-ino, Mörbylanga, Svedujo.
327. Jönsson Karla, f-ino, Hörby, Svedujo.
328. Bergholtz Ingeborg, f-ino, Hörby, Svedujo.
329. Nordling Siri, f-ino, Harnäs, Svedujo.
330. Frostenson Lydia, instruistino, f-ino, Creutzgatan 6, Stockholm, Svedujo.
331. Lindgren Curt, Box 51, Heby, Svedujo.
332. Wolmer Signe, s-ino, Tungelsta, Svedujo.
333. Hallerström Tore, Billsbro, Vingaker, Svedujo.
334. Berg Gunhild, f-ino, Möregatan 7. 6 tr., Stockholm, Svedujo.
335. Camitz E., s-ino, Blanchegatan 14, Stockholm, Svedujo.
336. Eriksson Gunvor, f-ino, Blanchegatan 14 (ĉe s-ino, E. Camnitz), Stockholm, Svedujo.
337. Andersson Hugo, Box 2646, Hofors, Svedujo.
338. Andersson Gunhild, s-ino, Box 2646, Hofors, Svedujo.
339. Ohlsson Rut, f-ino, Pomona, Boras, Svedujo.
340. Paulsen Linnéa, f-ino, Hasselbacksgatan 11, Boras, Svedujo.
341. Björk Valborg, f-ino, Kungsgatan 8, Boras, Svedujo.
342. Pettersson Tage A., komercisto, Matrosgatan 4, Göteborg, Svedujo.
343. Turner Fred. H., c/o Sveda Esperanto-Federacio, Tegelbacken, Stockholm, Svedujo.
344. Andersson Elner, Box 32, Warmsätra, Svedujo.
345. Gullberg Ingrid, f-ino, Slottet, Sturefors, Svedujo.
346. Larsson Johanna, f-ino, Vika st., Svedujo.
347. Mellberg Gunni, f-ino, Amal, Svedujo.



348. Winberg Anna-Greta, f-ino, Gröngatan 519, Uddevalla, Svedujo.
349. Andersson Wera, f-ino, Hoxeröd I, Uddevalla, Svedujo.
350. Atlas Helga, s-ino, Amiralsgatan 18, Malmö, Svedujo.
351. Josefsson Helmi, f-ino, Agnegatan 40, Stockholm, Svedujo.
352. Wahlström Siri L., f-ino, Varvsgatan 8, Stockholm, Svedujo.
353. Müller Maria, f-ino, Krukmakaregatan 5, 2 tr., Stockholm, Svedujo.
354. Ericsson Eva, kontoristino, f-ino, I lejonet 9, Stuvsta, Svedujo.
355. Olsson Agda, f-ino, Ljunggatan 4, C., Göteborg, Svedujo.
356. Flycht Albin, ingeniero, Fack 155, Kristianstad, Svedujo.
357. Almqvist Marta, f-ino, Augustenborg, Ronneby, Svedujo.
358. Ganz Mimmi, s-ino, S. Kopparslagaregatan 33, Gävle, Svedujo.
359. Holm Ellen, f-ino, Brunngatan 60, Gävle, Svedujo.
360. Nyberg Elsa, f-ino, Fagernäs 116, Boden, Svedujo.
361. Nylén Paul, redaktoro, Gröna Villan, Huddinge, Svedujo.
362. Björnemo Albert, instruisto, Vamhus, Svedujo.
363. Johnsson Margareta, f-ino, Arbetshemmet, Malmköping, Svedujo.
364. Forsman Arvid, Elsas 1, Kumla, Svedujo.
365. Pagar Mario, kontoristino, f-ino, Karja 18, Narwa-Jõesuu, Estonio.
366. Läll Aade, instruistino, s-ino, Alberti 28—3, Tallinn, Estonio.
367. Erich Antonina, oficistino, s-ino, Vene-Balti 28—8, Tallinn, Estonio.
368. Painer Daisy, korespondantino, s-ino, Imanta 19—1, Tallinn, Estonio.
369. Ambrojunas Vanda, oficistino, s-ino, Vene-Balti 26—2, Tallinn, Estonio.
370. Kearney Roy Alan Mount, instruisto, 95 Cromwell Road, Wimbledon, London S. W. 19, Britujo.
371. Guillaume Jean, ingeniero, Rue de Chabrol 34, Paris, Francujo.
372. Tible, oficisto, Rue du Vieux Marché aux Chevaux 1, Lille, Francujo.
373. Couffinhal, emeritulo, Calagrac par Lacé — pède (Lot et Garonne), Francujo.
374. Schmitt, Rue de Mont-Désert 4, Nancy, Francujo.
375. Muszak Mieczysław, senlaborulo, Podwal 15 —95, Lublin, Polujo.

Pro manko de la spaco ni prokrastas presigon de pluaj aliĝoj. Gis nun aliĝis pli ol 400 kongresanoj el 25 landoj.

## ANONCOJ

Samideanoj: Esperanto en la praktiko estu nia fina celo, ĉu ne? Esperantistoj, kiuj kapablas traduki teknikajn artikolojn pri Diesel — motoroj por aperigi ilin en siaj naciaj gazetoj teknikaj bonvolu sciigi siajn nomojn kaj adresojn al s-ro G. van Heek, Geerdinksweg 58, Hengelo (O), Nederlando.

Norvega Esp. instruisto trabiciklos la randojn ĉirkaŭ Balta Maro (ankaŭ Sovetio) al Jubilea Kongreso. Serĉas gekorespondantojn. Adreso: O. T. Nicolaisen, Storgaten 31, Harstad, Norvegujo.

26-jara fraŭlo, gvidanto de amika rondo esper. deziras korespondadi kun partoprenontoj de la Jubilea Kongreso el landoj: Aŭstralio, Usono,

Egipto, Japanujo, Ĥinujo kaj Grekujo. Respondo garantiata. Skribu al s-ro A. Sanik, Lublin, Królewska 13, Polujo.

### ATENTU! GRAVE!

La 5 de aprilo la radiostacio Varsovio kaj Lwów disaŭdigis paroladon de s-ano kapitano J. Silhan el Lwów pri la Jubilea kaj pri la kongreso de UABO. La sama prelego estos ripetata el radio Lyon P. T. T. 463 m. 100., la 15 de majo, je la 20.07 laŭ somera tempo.

Samideanoj, aŭskultu kaj skribu al „Polskie Radio“ Warszawa, Zielna 25, petante insiste oftajn kaj regulajn esp. — disaŭdigojn.

# NIA KONGRESO UNIVERSALA OKAZINTAJO ESTU MONDSKALA

„La Jubilea“ estas senpaga por ĉiu Kongresano! Abonpago por 8 numeroj estas 3 zł. 50 gr.  
Poŝtĉekkonto: Warszawa, P. K. O. 23445. Adreso: Chmielna 26/8.

Wydawca: Komitet Organizacyjny 29 Jubileuszowego Kongresu Esperantystów.  
Redaktor odpow.: Aleksander Hartman.

Drukarnia „SIŁA“, Warszawa, Marszałkowska 71, tel. 8-34-48.